

Pola Esperantisto

Nro 6

XXXI
JARO

JUNIO
1937

Esperantysta
Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-a DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI OIS LA 20-a DE
CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAO BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

SCIENCO KAJ LINGVO INTERNACIA

En antaŭa artikolo „Lingvoj internaciaj kaj iliaj portantoj” (P. E. n-ro 4) ni, stariginte laŭ naturaj kaj historiaj faktoj, ke popoloj en specialaj kondiĉoj kreadas tiajn komunajn lingvojn, penadis poste difini, kiaj fenomenoj en vivo de tiaj popoloj plej helpas al tiu ĉi inklino. Kaj ni trovis, ke scio kaj scienco pura kaj aplikita prezentas tian sferon de homa vivo, kiu konstante kaj forte, dank’ al sia naturo mem, penas plifaciligi kaj perfektigi internaciajn rilatojn, helpante ankaŭ al la ekapero kaj uzado de komunaj lingvoj. Nun ni povas ankoraŭ aldoni, ke tiu sfero de scienco kaj scio jam longe antaŭ Leibnitz kaj Zamenhof komencis kreadi internaciajn sciencajn vortojn, kaj tio jam estis vere naskiĝo de ne „arte” sed „science” farita lingvo internacia, kiun poste nia genia Zamenhof ordigis kaj preparis por la ĝenerala uzado, scienca kaj vivada. Do ne estas mirinde, ke scienco en unua vico devas subteni kaj uzi Esperanton.

Sed kio do estas esence tiu ĉi alta sfero de scienco? Nenio alia, ol kolektita noma sperto en ĉiuj regionoj de ho-

ma vivo. Ĝi estas kvazaŭ granda konstruaĵo, farita dum jarcentoj kaj jarcentoj de diversaj nacioj kaj apartaj personoj, komence, en malsupraj etaĝoj, diversloke diversaspekta, ĉar konstruita de homoj kaj nacioj, kiuj preskaŭ ne komprenas unu la alian, kaj plie, en pli supraj etaĝoj jam montranta pli da unueco, da beleco, da senriproĉa logiko. Jes, pli, sed ne tuton. Ĉar se, ekzemple, parto konstruita de Eŭropo dank’ al provizoraj kaj partaj lingvoj internaciaj kaj dank’ al la, menciita en antaŭa artikolo, poligloteco, havas komunan ĝeneralan ideon kaj similajn liniojn, parto konstruita de Azio aspektas alie, havante kiel esencon religiajn kaj filozofiajn sciojn, kaj en Ameriko ĉio estas pli praktika. Sed, vero, celo de scienco kaj scio, estas nur unu, kaj nur tia estas necesa kaj utila al la homaro. Do ni vidas, ke kompleta unueco kaj logika aspekto, de tiu ĉi granda konstruaĵo estas atingota en ankoraŭ pli supraj etaĝoj, kie devas regi dum konstruo perfekta reciproka kompreno de ĉiuj konstruantoj, de ĉiuj sciencaj opinioj kaj sistemoj, de ĉiuj filozofioj kaj

religioj. Kaj, kompreneble, tio povas okazi, nur helpe de la komuna lingvo de ĉiuj scienculoj: orientaj, okcidentaj, nordaj kaj sudaj. Do tiu alta sfero de scienco, celante tiamaniere veron kaj perfektecon, necesojn por la bona homa vivo, nepre devas portadi ian lingvon internacian, kaj ni, esperantistoj, devas fari, ke tio estu nia Esperanto!

Sed kiamaniere? Logike ni devas krei nian esperantan sciencon laboradon kaj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en aliaj partoj de la mondo: en Ĥinujo, Hindujo kaj Tibeto, en individueca Ameriko kaj en areca Rusujo. Laŭ karaktero de nia ĝenerala agado, ni devas partopreni la ĵus priskribitan konstruadon de palaco de la homo scio kunigante kaj reciproke ligante diversajn sistemojn kaj metodojn, uzatajn en tuta mondo. Jen grava tasko por la esperanta scienco, jen larĝaj, allogaj, horizontoj por niaj scienculoj de estonteco! Sed, en nuna stato de nia movado, tio estas nur ĝenerala direkto de agado, kiu praktike postulas diversloke diversajn rimedojn kaj agadmanierojn. Tiuj manieroj dividiĝas ie du partoj: farataj de supre, kaj de malsupre, de Dio, aŭ diaj rimedoj, kaj de homo, aŭ homaj rimedoj. Laŭ distingo de nia eminenta filozofo Hoene-Wroński*). Ni lasu diajn rimedojn, eble al venonta artikolo, kaj nun konsideru almenaŭ parte pli kompreneblajn kaj certajn, laŭ nia vidpunkto, homajn rimedojn.

Sciencon gardas kaj puŝas antaŭen instruistoj. Sed neniu naskiĝas instruita — diris latina proverbo. Ankaŭ ĉiu scienculo, kiam li ĵus transis sian universitaton, devigan kaj ĝenerale uzatan sciencon en nacia lingvo, ne ankoraŭ scienculo, sed nur science instruita homo. Sed, se li post tiaj studadoj ekvolas prilabori ian apartan sciencon temon por doktoriĝi, aŭ ĝenerale por daŭrigi utilan sciencon laboron, li samtempe fariĝas komencanta scienculo — malgranda radiketo de tre granda kaj bela

floro-scienco. Ni devas, obeante al la miljara orienta saĝeco, pensadi pri tiuj ĉi radiketoj kaj zorgi ilin, ĉar ni volas influu belan floron kaj fari ĝin pli bela. Ĝenerale kaj precipe en pli malgrandaj nacioj, ĉia komencanta scienculo tute ne trovas en sia nacia lingvo necesajn verkojn de lastamomenta scienca laboro en elektita fako kaj temo. Ĉar, memkompreneble, neniu volas prilabori, malverajn, jam ĝenerale uzatajn kaj larĝe preparolitaĵojn en naciaj verkoj, faktojn kaj temojn. Profesoro, kiu donas al nia komencanta scienculo, temon de la referato, nepre montras al li necesajn novajn aŭtorojn, sed, bedaŭrinde, unua el ili verkas en franca, alia en germana, kaj tria, eble, en angla lingvoj. Ne estas mirinde, ĉar tiuj ĉi tri aŭ kvar plej fortaj nacioj ludas nun gravan rolon en scienco, sed ankaŭ reprezentanto de unu el ili devas, por efike science laboradi, koni la lingvojn de du lastaj, ĉar alie ĉiuj liaj sciencaj informoj estos malfruigitaj. Por la malpligrandaj nacioj, la afero estas ankoraŭ pli malbona. Mi konas persone multajn junajn polajn fizikistojn. Dum konferencoj kaj private mi ofte paroladis kun ili pri la lingva demando, kaj ili ĉiuj certigis min, ke por pola fizikisto nun nepre neceso estas scio de tri ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj ne nur por kompreni verkojn, ĉar tio estas pli facile, sed por paroli kaj kompreni partoprenantojn en multaj necesaj internaciaj konferencoj kaj debatoj. Alie juna scienculo nenion povas publikigi, kaj nenion el tio publike defendi.

Do vi vidus, ke junaj adeptoj de scienco, devas, por fariĝi scienculoj, perdi multe da laboro kaj tempo en perfekta studado de kelkaj fremdaj lingvoj, kaj ke scienco tio estas perdita laboro! Vi povas imagi, kian grandan penegon faris eŭropaj scienculoj por atingi la antaŭe menciitan unuecon de eŭropa scienco! Kaj vi sendube komprenas, ke atingo de tutmonda unueco en tiu afero per la ĝisnunaj metodoj, sen vera lingvo internacia, sen Esperanto, estas neebla!

Do ni revenu al niaj radiketoj. Kiamaniere helpi ilin? Kompreneble ni devas eldonadi por ilia uzado sciencajn verkojn (tradukojn) en esperanta lingvo. Estas grava tasko kaj malfacila, sed se limigi tian agadon al la eldona-

*) Hoene-Wroński — pola matematikisto kaj filozofo de la pasinta jarcento. Liaj logikaj konstruaĵoj de diversaj aperoj de scienca vivo kaj de aplikado de scienco al vivo estas tre taŭgaj por la supremenciita unuigo de scienco de diversaj epokoj kaj nacioj.

do nur de verkoj necesaj al la junaj, komencantoj scienculoj — tasko estas pli facila kaj same utila. Tiaj verkoj estas duspekcaj: Unua speco estas raportoj pri plej lastaj sciencaj esploroj kaj laboroj, presitaj multenombre en naciaj sciencaj gazetoj. Neble estas ĉiujn traduki esperante, do oni devas eldoni kelkajn esperantajn sciencajn gazetojn, kaj tie traduki nur ĉefajn artikolojn fremdlingvajn kaj pri aliaj, nepre ĉiuj de koncerna fako detale raportoj. Tia gazeto esperanta scienca baldaŭ post la apero ricevas multajn raportojn de aŭtoroj mem, kiuj bone konscias necesecon de tia agado, kaj la afero estos tre faciligita. Dua speco de sciencaj, tradukotaj esperante verkoj, estas unuaj ĝeneraligoj de la supre montritaj raportoj aŭ libroj jam enhavantaj pli ĝeneralajn sciencajn demandojn. Tiuj verkoj estas tre gravaj kaj necesaj por junaj scienculoj, ili ne estas tre multnombraj, kaj ĉiujn oni devas traduki Esperanten. Krom tiaj du kategorioj, aperadas ankoraŭ verkoj enhavantaj ĝeneralan pritraktadon de granda parto de la scienco, aŭ tutan ĝeneralan laŭ novaj ideoj kaj opinioj. Tiaj gravaj, ofte en multaj volumoj, verkoj ne estas tre necesaj en esperanta traduko, ĉar ilia apero jam montras, ke laboro scienca rilate al donita demando estas finita, la afero jam eniras en oficialan sciencan, kiu estas, kiel ni vidis, kampo de agado de ĉiu nacio en nacia lingvo.

Do ni rimarkas, ke dank' al tiuj, relative malgrandaj, aferoj: eldonado de kelkaj sciencaj gravaj gazetoj kaj tradu-

kado de plej aktualaj en ĉiu lako sciencaj verkoj — nia Esperanto povas fariĝi vera **labora scienca lingvo**, helpa efike al tiuj niaj junaj radikoj, kiuj tuj, en preskaŭ sama momento, helpos nepre tiel utilan por ili iniciaton, uzante nian lingvon, kaj fariĝante veraj esperantistaj scienculoj. Sed kun scienculoj estas kunligitaj iliaj helpantoj kaj poste ĉiuj intelektuloj, do tuta nacio. Do Esperanto tiamaniere povus kaj nepre devas disvastiĝi. Tion pravas ekzemplo de malnova latina lingvo kaj simpla logiko: disvastiĝi io, precipe koncernanta intelektan laboron, povas nur de pli saĝaj al malpli saĝaj elementoj. Pripensinte la aferon, ni vidas, bedaŭrinde, en ĝisnunaj metodoj de disvastigo de nia lingvo — de la multaj lernantoj — ĝis la popolo esperantista — teruran eraron, ĉar influoj en nia societo iras en kontraŭa direkto: de scienculoj kaj kleruloj — al la granda societo kaj al multaj lernantoj.

Cu estas malfacila la desegnita de mi vojo? Povas esti, sed mi estas konvinkita ke ez nuna nia stato ĝi estas tute ebela, ĉar tradukistojn ni havas multegajn kaj diversfakajn. Ni havas ankaŭ bonajn kaj riĉajn homojn, kiuj helpadis kaj en malpli gravaj aferoj. Ĉiuj naciaj scienculoj niaj subtenos kaj dank' al ilia helpo ni povas ricevi monan subtenon de registaroj, kio faros niajn eldonaĵojn belaspektaj kaj allogaj. Estas dezirinde, ke ĉiu povanta faru siajn proponojn en tiu afero al la nunjara kongreso, por la deviga decido.

IPE.

29 UNIVERSALA JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO

VARSOVIO 7—15 DE AŬGUSTO 1937.

La Prezidanto de Pola Respubliko prof. dr-o Ignacy Mościcki akceptis la Altan Patronadon de la 29-a Universala Kongreso de Esperanto.

La Honoran Komitaton eniras ĉiuj ministroj, Prezidanto de l' ĉefurbo kaj aliaj altranguloj.

NOVA BELEGA LOĜEJO DE LKK.

LKK. ricevis novan belegan loĝejon en domo de Hotelo Polonia (Al. Jerozolimskie 39/41) tuj apud la centra stacidomo. Kongresa oficejo jam ĵustuliĝis en ĝi kaj funkcios de la naŭa horo ĝis la dudekuna ĉiutage. En tiu ejo estos la akceptejo de la Kongreso.

PROGRAMO.

Programo de la Kongreso antaŭvidas multajn interesajn aranĝojn. Ni notu: 1) Soleaĵon sur la tombo de l' Majstro, 2) Feston de Veteranoj, 3) Enmurigon de Zamenhofa memortabulo, 4) Teatron, dum kiu oni ludos esperantlingve „Consilium Faenlhtis” de A.

Fredro — trad. A. Grabowski, ankaŭ estos baletoj kaj koncertoj, 5) Internacia Balon, 6) Esperantan Kabaredon, 7) Literaturan Vesperon, 8) Ekskurson al Białystok, 9) Laborkunsidojn, 10) Gvidadon tra la urbo, 13) Postkongresajn ekskursojn k. t. p.

En la kadroj de la Kongresoj okazos Blindula Kongreso. Konferencoj de TEKA kaj TAGE, kies signaldiro estas „Esperanto en la lernejoj!“

Fervoja rabato en Polujo estas 33% tien kaj reen (grupoj 60 pers. 50%) Blindulej kaj akompanantoj havas 50% rabaton. Fervoja rabato en Belgio, Francujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Ni klopodas pri plua rabato. Vizoj estas senpagaj.

Kuravanoj estas organizataj el 15 landoj. Pola vojaĝoficejo „Orbis“ filioj kaj reprezentantoj en multaj landoj helpas aranĝi la vojaĝon.

MALKARAJ LOĜEJOJ.

LKK. certigis al kongresanoj, kiuj sufiĉe frue aliĝos, malkarajn kaj bonajn loĝejojn. Kiu do vere volas malkare aranĝi sian kongresestadon en Varsovio aligu tuj al la Jubilea.

Komunaj loĝejoj kaj hoteloj estas malmultekostaj. Demandu prezojn.

Mangaĝo en Polujo estas tre malmultekosta. Ekz. bona tagmangaĝo 1—2 zl.

SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO.

La Solena Malfermo de la Kongreso okazos en la Salonego de la Varsovin Filharmonio.

BALO EN LA URBDOMO.

La internacia Balo okazos en la reprezentaj salonoj de la Urodomo.

URBOPLANO DE VARSOVIO POR ĈIU KONGRESANO.

Ĉiu kongresano ricevos en kongresdokumentoj urboplanon de Varsovio kun signitaj ĉiuj tram kaj aŭtobuslinioj.

SPECIALAJ NUMEROJ DE ESPERANTAJ GAZETOJ PRI LA KONGRESO.

Aperis specialaj numeroj de „Heroldo de Esperanto“ kaj de „ESPERANTO“ kun pronogandaj tekstoj pri la Jubilea.

ĈIUTAGA GAZETO EN ESPERANTO.

Dum la kongresaj tagoj aperos en Varsovio ĉiutaga grandformata gazeto esperanta, kiu donos ĉiujn aktualajn informojn (politikajn kaj aliajn) kaj,

kompreneble, detalan kongresraportaron. Ĝin gvidos eminentaj samideanoj-jurnalistoj. LKK akceptos abonon por ĝi ankaŭ de ne-kongresanoj.

ORA LIBRO.

Ĉiu kongresano ricevos senpage la „Oran Libron de Esperanto“. Ĝi estos belega eldono, gradformata (240 paĝa). La eldonon prizorgas la eldono „Literatura Mondo“ en Budapeŝto. Aldone ĉiu kongresano ricevos kutiman kongreslibron.

KONGRESAJ GLUMARKOJ.

Aperis belaj 3-koloraj kongresaj glumarkoj. Por 1 zl. aŭ 2 respondukuponoj ni sendas 50 glumarkojn. Uzu sur ĉiu via korespondajo la kongresan glumarkon.

SPECIALA VAGONARO AL BIALYSTOK.

Merkrede, la 11-an de aŭgusto, okazos pilgrimado de la Kongreso al Białystok, naskurbo de dr-o L. Zamenhof. Urbo Białystok solene akceptos nian Jubileon. Speciala komitato en Białystok energie preparas lokan programon. Detalojn ni aperigos en unu el plej proksimaj niaj komunikoj.

SPECIALA KURSO POR TRAMISTOJ.

Direkcio de Varsoviaj Tramoj kaj Autobusoj eldonis ĉirkuleron pri speciala kurso de Esperanto, kiujn aranĝas la direkcio mem. Ĉiuj tramistoj, kiuj finos la kurson, ricevos por la kongresa semajno rubandon kun verda stelo. La kurson gvidas nia lerta kaj talenta Ĉe-instruisto s-no Tiberio Morariu.

SOLENA FINO DE LA KURSOJ DE MORARIU.

La 7-an de junio en la salono de la Blindula Instituto okazis solena fino de la kursoj, gviditaj de s-ro Morariu. La solenaĵon partoprenis ĉ. 250 pers. inter kiuj estis multaj konataj esperantistoj. En la nomo de LKK parolis vicprezidanto s-ro L. Klimecki. En la nomo de lernantoj parolis s-roj: Majewski kaj Mitnik. Post la oficiala parto okazis koncerto kaj komuna fotografado. Ĉiuj kursanoj estis tre kontentaj pro la kursoj.

BAGHY EN VARSOVIO.

Nia konata kiaj ŝatata poeto Julio Baghy estas ankaŭ bonega Ĉe-instruisto. Pro la subita forveturo de s-no T. Morariu Varsoviaj venis Julio Baghy,

kiu gvidas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Ankaŭ estas komencitaj specialaj kursoj por tramvojistoj.

GRANDA SUKCESO DE POLICAJ KURSOJ.

Policaj kursoj de Morariu en Varsovio havas grandegan sukceson. En ĉiu leciono de tiuj samtempe gvidataj kursoj ĉiam la nombro de kursanoj kreskas. Novaj samideanoj policistoj furos dum la kongreso grandan servon. Inter la kursanoj troviĝas ankaŭ varsoviaj policistinoj.

ALIGOJ AL LA KONGRESO.

La nombro de aliĝintoj ĉiam kreskas. El Usono aliĝis 12 samideanoj, el Ja-

panujo 2, el Aŭstralio 4 kpt. Sed kelkaj landoj en Eŭropo ankoraŭ estas tre malmultnombre reprezentataj. La landaj asocioj zorgu, ke multaj viaj membroj partoprenu la Kongreson.

Karaj Samideanoj en la tuta mondo! Amase partoprenu nian Universalan Feston en Varsovio! Tuj legeble plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin al Loka Kongresa Komitato de Universala Jubilea Kongreso de Esperanto, Varsovio, Al. Jerozolimskie 39/11.

STANDARDOJN VERDAJN ALTE TENOS DUM LA JUBILEA EN VARSOVI. INI

Komunikoj de Pollanda Esperanto-Delegitaro

Priparolinte dum sia komitata kunsido la 10-an de junio 1937 la situacion de la Esperanto-movado en la tutmondo kaj konsiderinte:

- 1) ke unuiĝo de la Landaj Asocioj Esperantistaj estas dezirinda kaj necesa,
- 2) ke ankaŭ plua ekzisto de Universala Esperanto - Asocio kiel organizujo de individuaj Esperantistoj de la tutmondo estas same dezirinda kaj necesa,
- 3) ke pro bono de la Esperanto-movado interkonsento inter IEL kaj UEA estas nepre necesa, des pli ke la agadkampoj de ambaŭ ne kontraŭstaras reciproke.

decidas unuanime

- 1) aparteni plue al IEL, kiel unuiĝo de Landaj Asocioj Esperantistaj,
- 2) rekomendi al la Esperantistoj en

Dum la VII. Pollanda Kongreso de Esperanto, okazinta la 31. V. — 1. VI. 1936. en Kraków, oni decidis, ke la

NUNJARA GENERALA KUNVENO DE P. E. D.

okazu dum la 29-a Jubilea Univ. Kongr. de Esper. en Warszawa, t. e. inter 7-15 de aŭgusto 1937. Preciza dato troviĝos en la Kongresa programo.

En ĝi rajtas partopreni la aliĝintaj grupoj per siaj rajtigataj reprezentantoj. Ĉiu

Polujo pluan apartenon al UEA kaj turnas sin

- 2) al ambaŭ organizadoj kun varma alvoko, ke ili antaŭ la Jubilea Kongreso interkonsentu pri formoj de kunagado, por ke la JUBILEO de duonjarcenta ekzisto de Esperanto povu esti festata en Varsovio, la ĉefurbo de naskolando de niaj lingvo kaj Majstro, EN ATMOSFERO DE PLENA HARMONIO KAJ VERA SEMIDEANECO.

Pollanda Esperanto-Delegitaro

PREZIDANTO Prof. Dro Odo Bujwid
KOMITATANOJ

Ing. Eugeniusz Tor, Dr. Leon
Rosenstock, Józef Altus
Ludwik Kutscher

GENERALA SEKRETARIO

Mgro Tadeusz Hodakowski.

reprezentanto devas posedi skriban rajtigon, en kiu estu citita nombro de la membroj. Ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

Tagordo: 1. Raportoj, 2. Fikso de la sekvanta G. K., 3. Demandoj kaj proponoj.

Art. 26. § 1. La G. K. estas decidopova, se la ĉeestantoj rajtigataj al voĉdono reprezentas minimume 1/4 da ĉiuj

voĉoj, per kiuj disponas ĉiuj membroj de P.E.D. kune.

§ 2. Se la G. K. ne okazus pro manko de la nombro necesa laŭ § 1, devas la Estraro en du sekvantaj semajnoj kunvoki denove la G. K., dum kiu la deci-

doj estas alprenotaj sendepende de la nombro de reprezentitaj voĉoj. Tiun ĉi novan G. K. ne koncernas normoj de art. 21 §§ 1 kaj 1 art. 25 § 3 alineo 1.

Estraro de P. E. D.

ELIZA ORZESZKOWA.

EN ETRUSKA TOMBO.

(EL LA KOLEKTO: „LASTAJ NOVELOJ“).

Titus Quinctius (legu: Kvinkejus) Flaminius, la trinoma patricio roma, forlasis sian luksan vilaon kaj iris kontraŭ la loko, kie oni komencis konstrui al li superelegantan palacon. La vilao estis vastega, sed ne sufiĉis ampleksi lian grandecon, estis plena de riĉaĵoj, sed ne ĉiuj liaj riĉaĵoj trovis lokon en ĝi. Li do kapsignis, ordonis, oron pagtintigis kaj la tero tuj malfermiĝis por ensorbi la fundamentojn de konstruaĵo ĝigonta templo dediĉita al lia gloro.

Frue atingis Flaminius la pinton de homa feliĉo. Li estis maturiĝinta, sed tute ne maljuniĝinta ankoraŭ kaj laŭ honkreska, eleganta staturo, laŭ aglaj vizagtraĵoj, laŭ fieraj, severa frunto oni povis divenlegi, ke li apartenis al la gento de venkkonkeruloj. La kapon li portis altan, en la okuloj li havis sereton de kontenta dio.

Lian senatorveston orpalme kaj purpurbordere ornamitan postsekvis en senkuraĝa interspaco kelkhombra, elegantvesta aro da servistoj kaj klientoj. Ne tro longa promeno devis surpreni la ŝajnon de triumfiro, ĉar estis ja li, Titus Quinctius Flaminius, la promenantulo.

Faris tion eble la influoj de mirbela somervetero, ĉu de novaj, hieraŭ el Romo ricevitaj honoroj, ĉu de komenciĝintaj laboroj ĉe la dezirata palackonstruado, sed neniam pli, ol nuntage, Flaminius sentis sin fieraj kaj feliĉaj.

De la cerbo ĝis la piedfingroj pleniĝis lin, traonetris, ravigis la sentoj de fiero kaj feliĉo. La eleganta akompanantaro sekvis lin distance kun murmurado de mallaŭta interparolo, dume li — sur mirinde de romana arteco porfirplate pavimita vojo, inter mirtoj kaj buksoj

paŝante kun agla profilo liom alten levita, kvazaŭ per fieraj frunto li estus atingonta la ĉielon mem — rememordis kaj pensis.

Li rememoris la multpovajn kaj famajn antaŭulojn kaj ĝojis, ke ili estis povaj kaj famaj, sed pli multe eĉ pro tio, ke li mem ilin pove kaj fame superis. Li sentis du kune fierojn, farantajn al li duoble pli grandan ĝuon, ol tion povis fari unu. Li remaĉis la festenmanĝon, kies gusto trae penetris lian animon.

Li pensis pri grandaj, nekompareblaj, de si plenumitaj faroj. Per la majstre estrata militarto li detruis unu el eksterlimaj ŝtatoj kaj la duan per promesoj, minacoj, ĝonia intrigo li tiel implikis, ke ĝi mem jetis sin en la romanajn brakojn. Poste de dankaj Romo prokonsulo tie kaj prokonsulo alie nomita li piedpremis la konkeritajn popolojn, kiam ili levis la kapojn kaj kiam ili mallevis ilin, li ensorbis al ili viruson de diversa veneno, ke ili endormiĝu kaj estingiĝu. La romanaj legioj estrataj de lia militista genio, dispuŝis kiel romniĝeman vitron ĉion, kio defendante sian vivon kontraŭstaris ilin, kaj kie estis bezone ŝpari la batalemo de la legioj, anstataŭis ilin tie ruzaĵ liaj vortoj kaj malicaj faroj. Li kaj malgranda de simila al li nombro faris tion, ke la brilo kaj libero de ternopoloj jam al pasinta estinteco, dume la nuntempo kaj forta estonteco nur al Romo apartenas. Li mem eĉ ne scias, sur kiuj el pasintaj momentoj li estas haltigonta la memoron: ĉu sur pasigitaj de li sur batakampoj, surversitaj de sango kaj sternitaj de kadavroj de ven-

TRA LA MONDO SONAS KRI'
AL LA KONGREŝO VENOS NI.

SEN HEZITO, SEN LA DUB'
AL VARSOVIO, BELA URB'!

kitaj malamikoj, ĉu sur tiuj, kiam per lia ruzo trompitaĵoj popoloj saĝaj kaj gustkonantaj — eĉ pli! — ol lia patrujo — pli saĝaj kaj pli gustkomprenantaj — jetadis sub liajn piedojn triumfkronojn kaj kun himno por lia gloro sonigata — iris en la tombon.

Lia memoro ŝancelis ankaŭ inter tiuj dekmiloj da funtoj da oro, per kiuj li revenante post militiroj riĉigadis la ŝtat-trezoron de Romo kaj inter la amaso da multvalora metalo kaj plimultvaloraĵoj ol ĝi majstroverkoj, per kiuj li dum tiuj ekspedicioj riĉigis sin mem kaj nun de la pinto ĝis malsupre estis plenigontaj lian palacon. En tiu palaco pretiĝos la muroj de atriumoj kaj triklinioj (manĝoĉambroj), ĉirkaŭkuroj ilin la peristiloj (ĝardenĉambroj) kaj ĝardenoj, eksonos en ĝi festenoj kaj muzikoj, ke la Famao centrumpete dissonigos tra la mondo: Flamininus granda! Flamininus potenca! Flamininus nekomparebla, nusuperebla, dia!

La ebriiĝanta rigardon, per kiu li ŝancelvadis sur la ĉielbluo, li mallevis kontraŭ la teron kaj larĝen sur ĝi rigardigis okulojn.

Ne tro distance makuliĝis aro da homoj, kiu akompanata de fosil- kaj martelfrapado, de tondrado de faligataj ŝtonoj, preparadis la grundon kaj fundamenton por la templo de lia grandeco. Iom pli fore li ekvidis laborantojn ĉe lia vinberejo, aŭ homojn, kiuj apogante sin per paŝtistbastonoj pelis lian bestaron al paŝtejo kun fidelaj hundoj flanke de siaj senŝuaj piedoj. Ankoraŭ pli distance sur vastaj liaj plugkampoj kiel mizeraj ĝibumitaj fantomoj ŝoviĝis plingistoj kaj plej fore, el kie alsonis la murmuro de akvo dispuŝata de remiloj, naĝis enaere al migrantaj birdoj similaj multaj veloj de liaj ŝipoj.

Flamininus rigardis, miris, demandis sin mem kaj diojn: „ĉu eble tiuj plugantoj, teron fosantaj, per remiloj la marondojn dispuŝantaj kaj sur ŝtandangeraj vojoj nudpiede paŝante al paŝtejo la brutarpelantaj estas homoj, se li estas homo?“ aŭ: „ĉu li estas homo, se tiuj estas homoj?“

Ne — tia malegaleco de figuroj, saĝo, sorto, ne povas ekzisti inter la estaĵoj de unu origino! La dioj ŝercis, la saman nomon donante al tiaj, kia li estas kaj

al tiaj, kiaj ili... Licencas ŝerci al dioj, sed ankaŭ al li ridi pro iliaj ŝercoj. Ha ha ha! Se almenaŭ unu similaĵo, almenaŭ unu komunajo inter li kaj ili! La figuro kaj korpomembroj? Kion ja tio pravas? Li similas Febon kaj Merkurion Loquens, ili malgrasiĝintajn ciklopojn. La nepreco morti? Li, kvankam li mortos, tamen ne mortos. Liaj faroj havos eterne memoran famon kaj la nomo en la memoro de glorantaj ĝin generacioj akiros senmortan daŭron! Ne — opinii kaj kredi ne estas eble al li aliĉ, ol, ke sur la tero kaj en la ĉielo ekzistas generacio de dioj kaj ke li estas de tiu generacio dio.

Tiel pensis, fantaziis, ĝojis, sin mem al la rango de dioj suprenlevis Titus Quinctius Flamininus, la granda, fama, superriĉa, multfoja konsulara patrico kaj eminentulo de potencega Romo.

Subite el malhela grupo de homoj, al kiu li proksiniĝis, elkuris la laboristgardanto kaj renkonte al la sinjoro rapidiĝe profunde kliniĝinta komencis ion interesan aferon rakonti.

Li rakontis, ke la fosiloj de fosistoj tuŝis antaŭbaldaŭ ian surfacon malmolan sed rompiĝeman, kiu efektive sub iliaj batoj rompiĝis kaj aperigis eniron en la subtterejon fermitan per pordo el malmola metalo. Kio povas esti tiu subterejo? Neniu scias, ĉar neniu ĝian internon eniri kuraĝas. Eble tiu fendotruo subite sub homaj piedoj ekiginta estas eniro en la tabernaklon de Songo aŭ Nokto? Eble tie insidatendas la mortemulojn la subteraj geniuoj por ilin tiritreni en la regnon de eterna malĝojo?

Mokride aŝkultis Flamininus tiujn plebejajn supozojn kaj turnita al sia akompanantaro li ekvokis:

— Torĉon!

Poste li aldonis:

— La skribistoj kaj grekaj miaj lektoroj tien ĉi!

Kaj kiam la vokitaj proksimiris, li diris radiantokule:

— Mi ardas por scivolo esplori tiun subteran ejon. Eble ĝi montros al mi la trezorojn aŭ belajojn ankoraŭ nekonatajn.

— Estas prave, ho clarissime, — rimarkis unu el skribistoj — ke la tero por la plej granda el siaj filoj ne havu sekretojn.

Dume lerta Greko aldonis:

— Unuj sole Grekoj ĝis nun elŝiradis de la ĉielo kaj la tero iliajn sekretojn. Prave vi, Flamininus, iĝis favorato de mia patrujo, ĉar vi estas suĝa, scivola kaj kuraĝa.

Malkuraĝon Flamininus ne konis kaj pro scivolemo ardis lia vizaĝo, kiam sub batoj de marteloj krevis la pordo mirbele el metalo forĝita kaj li kun torĉo en la mano trapaŝis la sojlon de la subterejo.

Apenaŭ tamen li estis ĝin trapaŝinta, li ektremis, paliĝis, la torĉo elfalis el lia mano.

— Kio jen? — li ekvokis. — Ĉu vi estis vidintaj? Kio ĝi estis? Infera vido rapide, kiel fulmo estingiĝinta? Ĉu sensua trompvizio sendita de koleriĝintaj geniuloj? Ĉu vi estis vidintaj? Kio jen estis? Diru!

Vidis ĉiuj, sed neniu ion diris, ĉar neniu sciis, kio povis esti tratranĉinta ilian vidosferon kaj — malaperinta. Ili staris palaj kaj tremiĝaj kun piedoj ekmoviĝantaj por forkuri, sed ne kuraĝantaj forkuri, kiam la estro ne foriĝis.

La brilo de kelkaj torĉoj dislumigis kameron negrandan, arte volbitan, plenan da imponaj ornamaĵoj kaj en ĝia mezo sur alta sarkofago kuŝigitan viro-figuron, bonege konveksan kaj precizan, admirindan, riĉe vestitan, kun agla profilo, longa barbo kaj granda orkrono sur nigraj harondoj. Oni povus ĵuri, ke tiu ĉi bela kaj forta viro, en plena sano sur tiu alta lito apenaŭ hieraŭ dormkuŝiĝis kaj ke li estas unu el tiuj ĉi, kiujn humile kaj subite sekvas nesuperblaj aroj.

Sed apenaŭ sur tiu endormiĝintan, grandan figuron estis falinta la torĉo-brilo kaj ĉirkaŭis ĝin la spiro de eniĝanta kune kun tiu brilo aero, kiam subite en unu fulmrapida momento ĝi malaperis kaj sur la sarkofago kuŝis nur iomo da griza polvo. Nur la granda orkrono signis lokon, sur kiu antaŭ momento en longaj harondoj kuŝis la kapo kun profilo de fiera konkeristo.

Nur mallongan momenton povis Flamininus subiĝi al timo kaj hezito. Bal-

daŭ li nuis al la lektoroj kaj skribistoj, ke ili lin sekvu, kaj li mem antaŭenpaŝis kontraŭ la sarkofago.

— Kial — li diris — tiu ĉi forta kaj bela viro tiel rapide malaperis antaŭ niaj okuloj, mi ne scias kaj la dian volon aŭ misteran naturprocedon en tio mi supozas. Sed tiu palpebrummomento, dum kiu mi estis lin vidinta, sufiĉis por veki mian respekton al li kaj mi ardas pro scivolo, kiu li estis, kion li estis farinta kaj kiu estis lia nomo.

Sur granda orkrono, en kiu la rozoj kaj plaĉaj laŭroj miksis sin kun la figuroj de venko- kaj glorigenuloj, li serĉis ĉizitajn literojn de lia nomo. Ĝi estis triumfa krono, tion li bone vidis kaj sur tiaj kronoj certe troviĝas la nomo de triumfanto. Ĝi troviĝas ankaŭ ĉizita ĉe la piedo de glorigenulo. Flamininus rimarkas ĝin, streĉas la rigardon, penas ellegi, ĝis post momento turnita al sia sekvantaro hezite li diras:

— La skribaĵo nekonata!

Kelkaj vizaĝoj kliniĝas enpeniĝe super la surskribo, kelkaj okulparoj eniĝas en ĝin kaj post kelkaj longaj minutoj konfuzitaj buŝoj murmuris:

— La skribaĵo kaj lingvo — nekonataj!

Kun ardanta vizaĝo esploras Flamininus diligente ĉirkaŭen la surfacon de sarkofago.

— Ankaŭ tie ĉi surskribo! — li vokis. — Torĉojn pli proksimen! Lumon! lumon!

La alta mortlito stariĝas en brilfajro kaj la ardantaj okuloj de skribistoj, lektoroj kaj ilia sinjoro droneniĝas en la volviĝantaj inter la skulptaĵoj surskribojn, ĝis el ĉies brusto eliras peza, kiel ĝemo, murmuro:

— La skribaĵo kaj lingvo — nekonataj!

Flamininus ekmoviĝis, la sentojuragano ĵetis ruĝon sur lian frunton.

— La nomon de tiu viro! dek mil da sestercoj kaj mian gracon al la deĉifronta tiun nomon!

Nun la torĉobriloj surverŝis la kamermurojn kaj aperigis sur ili aĵojn mirindajn, esprimigajn.

EL LA MALPROKSIMA, TERA ANGUL' ALVENOS VARSOVION ĈIU BONUL'.

NE PAROLU TRO MULTE, SED AGU KAJ POR KONGRESA KARTO TUJ PAGU!

Ĝi estis pentraĵoj, el kiuj oni povis ellegi, kiel vivis, kion posedis, kion amas, kion uzadis la kuŝanta nun sur la sarkofago kiel lomo da polvo. En unu nome loko prezentis la artisto multprezajn kaj pro preferata gusto konatajn birdojn, la fiŝojn devenantajn el malproksimaj riveroj kaj maroj, la korbojn je raraj fruktoj, la kruĉojn je rubenlikvoraj, la vazojn je mirbelaj floroj plenajn. Aliloke la ludistoj ludakompanis la rondojn de elastkorpaj dancistinoj, riĉaj ĉaroj velkuris sur la arenoj, malpacience atendantaj staris brilantaj pro ornamo ĉevaloj, trapaŝis milit- kaj triumfiroj floris fruktarboj, orbrilis kampoj kaj viŝberejoj, la ŝinoj elveturadis sur plenmaron. Sed eĉ pli.

Preter la pentraĵoj troviĝis en tiu tabernaklo de surda morto ĉie amaso da surskriboj kaj amaso da objektoj mirigaj, luksaj. Ĉe la murbiedoj, en niĉoj, sur postumentoj iaj pratempaj armilaĵoj, laŭ formo al neniu vivanta konataj, iaj pokalegoj kaj pladoj per skulptarto al la rango de artverkoj levitaj, la iloj, sur kiuj testudŝelo, oro kaj eburo varilis kun marmoro kaj rozligno, maloftaj juveloj, kronoj, prefere kronoj, amaso de tiaj kronoj, per kiuj ravita kaj danka homaro ornamas la frunton de siaj triumfantoj elektituloj.

Ĉio-ĉi prezentis supoze, elan nur parton de la riĉaĵo, potenco, feliĉo de la kuŝanta nun sur la sarkofago polvo-iomo.

Flamininus rigardis, miregis, adoris, ĝis li ekparolis:

— Riĉa kaj fama li estis. Per kiuj faroj li akiris la riĉecon kaj gloron? Mi deziras ekkoni la historion de liaj faroj kaj ĝojigi mian buŝon per la sono de lia nomo. Kvindek mil sestercojn al la ellegonto el tiuj surskriboj de la ĉi-historio kaj de la ĉi-nomo!

Divenlegi ĉiujn moadliterarojn spertaj estis la romanaj skribistoj, dume kian scion ne estis posedantaj el la plej instruitaj elektitaj grekaj lektoroj! Tamen post longaj minutoj ĉiuj timante la koleron de la sinjoro eldiris:

— Neeble!... La skribliteroj kaj lingvo — nekonataj!

La plej grava kaj plej kuraĝa el inter Grekoj komencis paroli:

— La tero, sur kiu vi, ho plej Moŝta, vian palacon konstrui intencis, estis tero de Etruskoj, regintaj ĝin tiom longe, ĝis kiam ne plaĉis al dioj krei ĝustajn mondestrojn — Romanojn. Mi divenas do, ke ni eniris unu el la tomboj etruskaj, en kiuj la popolo kutimis ĉirkaŭi siajn mortintojn per bildado de tio, el kio ili ĉerpis gloron, feliĉon kaj la kernon de sia vivo. Ĉu tamen tiu viro, kiu por unu palpebrumomento aperis antaŭ ni en tuta sia forto, beleco kaj gloro, al tiu popolo apartenis? Malfacile estas aserti, ĉar sur tiu tero, simile kiel sur ĉiu alia, multaj alterniĝante popoloj vivis, floris, pasis kaj foriĝis. La plej antikvajn tie konatajn Pelasgojn sekvis Kasenoj el Ketia, eksigitaj per Samnitoj, pereigitaj laŭvice de Galloj kaj poste kun Etruskoj defendunuige kunigitaj, kiujn el la tersurfaco ekstermis la Romanoj; ĉiu ree el la cititaj popoloj pasante forprenis kun si la langon en la regionon de pasinta kaj forgesita iameco. Do ne nur la nomo kaj la faroj de entombigita tie ĉi viro estas vualitaj antaŭ ni per netrapenetrebla sekreto, sed ni ne povas eĉ sciigi vin, el kiu gento li devenis. Ĉu li estis Pelasgo, Samnito, Gallo, ĉu Etrusko, ĉu eble li estis alveninta ĉi tien kun ankoraŭ alia, venkula, sed al ni nekonata gento, neniu el la mortemuloj, nek vi, ho Flamininus plej potenca el ili, hodiaŭ tion povas ekscii.

Finis ĉiujn vortojn inda Greko; la silento okupis la internon de tombokamero kaj ŝajnis al ĉiuj, ke trafluas ĝin plendemaj sonoj, kvazaŭ mallaŭta adiaŭo de poreterne forirantaj.

Post momento la Greko ankoraŭfoje ekparolis:

— Ĉio sur la tero, ho clarissime, estas kiel sablo volviganta desupre, kies unu polvonubon pasintan anstataŭas alia kaj tiel tra la temposenlimajo forŝvebas la polvaro de surteraj aferoj en senfinecon, en poreternan trankviliĝon, en forgesitecon, en tombon tiel grandan, ke kompare kun ĝi nenio estas la koloseco de oĉenoj, kiu nome tombo surhavas la nomon: pasinteco. Sur fundon de tiu tombo falis kune kun sia nomo, sia lingvo kaj famo de siaj faroj la viro, kiu dum mallonga tempo de restado antaŭ la sunvizaĝo eble eĉ

vin - ho clarissime — laŭ forto kaj famo egaligis. Jes. Tian leĝon decidis la dioj por potenca kverko kaj mizera herbo, por aglo kaj vermo, por mondo-reĝoj kaj brutarpaŝtistoj...

Cesis la Greko kaj Flamininus kun mallevita kapo kaj rigardo fiksita en la tero aŭskultis ankoraŭ. Li aŭskultis la eĥojn, kiujn la paroto de la Greko rebatis ĉe diversaj flankoj de lia propra interno.

Poste kiel homo ĉesiganta laŭte la serion de sekretepensoj li ekdiris:

— Kaj lia nomo: Neniul

Li surĵetis la togorandon sur la vizaĝon kaj per subita forpaŝo li forlasis la tombokameron.

Neniu el la ĉeestantoj kuraĝis lin sekvi kaj ĉiuj rigardis admirante, kiel li jen malplirapidante, jen plirapidante antaŭeniris sur orbrilan kampon, al la maro, simila al homo nescianta men, kien kaj pro kio li iras.

Li iris kaj haltadis jen kaj jen, ĉar ŝajnis al li, ke la tero en likvidan elementon ŝanĝita sub liaj piedoj kaj ĉirkaŭe fluigas ondojn neĉesemajn, neĉesemajn, senĉese unu la alian sekvan-tajn, forkurantajn, perentajn en spacoj neatingeblaj. Kaj kiam tio iĝis sub liaj piedoj kaj ĉirkaŭe kun la tero, aĉero, la sablopolvaroj sin senĉese sek-vante flugis unu post alia, traflugante, malproksimiĝante, foriĝante en la aer-sparoj havantaj nek limon nek finon...

En lia ondo li estis nur akvero, en lia polvaroj li estis nur sablero...

Kaj antaŭ unu horo li imagis al si...

Tiu ĉi jen dum mallonga momento de estado sub la sunvizaĝo estis eble simile pensinta... Eraris li kaj tiu ĉi... Flamininus ne povis toleri la penson, ke laŭ lia opinio li eraris kaj pretere la ondoj senĉese sub liaj piedoj fluantaj ŝanceligis liajn paŝojn kaj la polvaroj ŝoviĝantaj super lia kapo surŝutis per korodema polvo la okulon, palaton, gorĝon.

La kapon li kaŝis en la rando de senatora vesto kaj brila pro la ornamantaĵaj ĝin palmoj falegis teren en la vinbera ombro.

— Ho dioj! — li ĝemis — jen mi potenca kverko, malpliĝinta ĝis la alteco de eta herbo, jen mi aglo premiĝinta en la formon de vermo, jen mondo-reĝo egaligita kun la paŝtisto de la brutaro... Kie la grandeco sur la mondo?

Veron estas dirinta la simplulo, kies vortojn mokis Flamininus. En la etruska tombo loĝis subteraj geniuoj kaj al enirantaj en ĝin mortemuloj ili montris du senvestajn estaĵojn, el kiuj unu diris: „ĉi trapasos!“, kaj la dua: „Plej granda el la homoj estante — ĉi estas eta, kaj ĉi granda opiniante — ĉi frenezas!“.

Tradukis: **Józef Orzech**
Wejherowo.

LABORO, — TEATRO, ANKAŬ BAL' —
JEN ESTAS NIA VOKSIGNAL'.

NIA KONGRESO UNIVERSALA
OKAZINTAĴO ESTU MONDSKALA.

HEJTISTO

La horloĝo sur la stacidoma turo
ekbatis horon.

Alvenis temp' de la forveturo.

La fajfego de lokomotivsireno

superbruas la lastajn kofesojn, la petojn,
malebligas la lastan korinterkomprenon...

La larm' en okulo, la lasta manpremo...

Krako de la fermataj kupeo-pordetoj...

Ŝtalaj pulmoj ekspiras, eksiblas, ekbruas.

La vagonoj ektemas, moviĝas, ekskuas...

Jam for... jam for... jam for...

Brilas, ardas. Ŝtal-kor' de l' maŝino...

Ŝtalaj pulmoj ekspiras per griza vapor'...

Jam for... jam for... jam for...

* Brulas, ardas flamanta ŝtal-kor' de l' maŝino...

Li ŝutas la karbon en gorgon brulantan
 sen ĉeso, sen ĉeso, sen ĉeso, sen fino...
 Stalaj pulmoj ekspiras per griza vapor'...
 La vagonoj vitr-tintas, tremegas kaj skuas...
 En kaldrono la akvo siblas, bolas, bruas...
 Li ŝutas, li ŝutas la karbon en fornon
 Sen ĉeso, sen ĉeso, sen ĉeso, sen fino...
 Brulas, ardas flamanta ŝtal-kor' de l' maŝino...
 Li ŝutas la karbon, li ŝutas sen fino...
 Li ŝvite laciĝas, doloras la spino...
 tremas kruroj, tremas kruroj,
 la koro perforte laboras...
 En kaldrono akv' siblas, akv' bruas, akv' bolas...
 En foru' flamas karbo, en foru' flamas brulo...
 Vapore spiregas ŝtal-pulm' de l' maŝino...
 Ekklamas, inflammas pro brul' la okuloj...
 Li ŝvite laciĝas, doloras la spino...
 Li ŝutas, li ŝutas, li ŝutas la karbon
 sen ĉeso, sen ĉeso, sen ĉeso, sen fino...
 La pulmoj laciĝas, doloras, inflammas
 sangiĝas la lipoj...
 La kor' bati ĉesas...
 Li svenas...
 „Hel! rapidu!”
 Maŝinisto kolere malbenas:
 „Vi trompi min volas? Ha, estas sen dubo!”
 „Kion — danne — vi pensas?! Pro cent diabloj! huko!”
 La vagonoj vitr-tintas, tremegas kaj skuas...
 En kaldrono la akvo siblas, bolas, bruas...
 Je sekvonta stacidomo oni ŝanĝis hejtiston...

PARLEZ-MOI D'AMOUR... DE LUCIENNE BOYER EN VARSOVIO

Kanteto iam kantita eĉ de stratbuboj,
 kanteto iam eliĝanta el raŭkaj gramofonoj
 en lastrangaj tavernoj, kanteto preskaŭ
 naŭzanta iam pro ripetigado, — subite
 elektrizis la varsovan muzikeman publikon,
 ŝtopintan plen-plene la grandan opero-salonon.

Parlez-moi d' amour... ekkantis Lucienne Boyer,
 la fama ĉarma parizano. Sed ne, — ŝi ne
 kantis, kantitaj vortoj ne povas tiom profunden
 enpenetri en la korojn kaj kvazaŭ per forta
 kurento vibrigi ĉiujn nervojn, pulsigi ĉiujn
 sango-guletojn...

Lucienne Boyer ne kantis... per siaj
 veluraj okuloj kaj lipoj ŝi enspirigas
 vivon en la vortojn, kiuj ne plu estas
 kanto nur ia magia preĝo, ia enkorpiĝinta
 vivaĵo, io nenomebla kaj neesprimebla,
 sopiro al io, kion ne atingas la menso
 nur eksentas kaj komprenas la animo...

Parlez-moi d' amour — kantis Lucienne Boyer,
 kaj en la animoj de la kelkmila publiko
 traviviĝis dum tiu mallonga tempo —
 longajn jarojn kaj dek-jarojn daŭrintaj —
 idilioj kaj tragedioj, feliciĝoj, trompoj
 kaj malfeliciĝoj... pro amo, pro tiu
 raviga sento, tiu mistera kaj potenca
 forto, kiun posedas, regas, ordonas kaj
 ludas la Amo-angelo el Parizo...

Parlez-moi d' amour — ekkantis
 plenekstaze, kun krucitaj manoj kiel
 por sankta preĝo — Lucienne Boyer, —
 kaj amo, sankta kristala amo plenigis
 la korojn de la kelkmila aŭskultantaro,
 kiu kunfandiĝis per iu neimagebla
 forto harmonia en unu animon, en unu
 solan penson, unu fizikan estajon, sek-
 ŝantan ĉiun ŝian moveton kaj rigardon...

Preskaŭ dudekon da aliaj kantoj prezentis
 ankaŭ Lucienne Boyer. El ĉiu tia

miniaturaĵo ŝi scipovis fari grandan dramon aŭ epopeon.

Ni prenu el ili unu simplan kanteton: „Mon rendez vous”.

Eta pariza midinetino atendas sian malfruiĝintan amanton.

Ŝi atendas senpacience, ĉi maltrankviliĝas, koleras: ĉiunmomente ŝin ĝenas iu alia trairanto. Kun amariĝinta kaj ploranta koro ŝi volas foriri, kiam subite... ŝi ekmemoras, ke hodiaŭ estas lundo kaj la renkontiĝo estis fiksita je mardo...

Ĉu ne simpla, ĝojetiga historieto?

Ĝi tamen eligis larmojn, — jes: mi vidis grandajn, perloŝimilajn larmojn, ruliĝantajn sur la ŝminkitaj vizaĝoj de miaj najbarinoj ne nur junaj...

Sed, — kiel tion sukcesas Lucienne Boyer, — tion oni povas nur senti, travivi, kunvivi — sed nek rakonti, nek priskribi...

Por rakonti pri la kanto de Lucienne Boyer oni devas tiel rakonti kaj skribi, kiel ŝi kantas ...

Henryk GIEŁB.

Al Sinjoro Julio Baghy

Pro „Verda Kor” kun kordediĉo,
Kiujn mi legis „con amore”,
Mankas al mi vortar-sufiĉo,
Por ke mi danku vin tutkore.

Vi estas vere „kor’ de koroj”*)
Aminda kaj ŝatinda Baghy!
Ne estas dankoj kaj honoroj
Por ĉarni-donaĉon vian pagi.

El via libro per okuloj
Mi trinkis amon kun pasio...
Vi, apostolo, en anguloj
De frost’ kruela Siberio...

Militkaptito, vi disjetis
Semojn de l’ vero esperanta...
Pri nom-kompreno vi profetis
En tondroj per parol’ brilanta...

*) Nomo donita al Shelley de samtempuloj.

AUGUST EIGNER.

Mirinde tion vi rakontas
Kiel elkreskis la „Sunfloro” —
Ĉinino —, kiel Ĉin’ renkontas
Polinon, Rusojn kun adoro:

Kiel Polinon kun Hungaro
Kunligis orfaden’ de l’ amo...
Kvankam dividis ilin maro,
Restis en libr’ arom’ kaj flamo!

Fremdulojn vi per Esperanto
Kunigis por grandega celo...
Ĉar via voĉo estas kanto,
Kor’ via — forto kaj mielo!

Ĝis nun ne estis libr’ simila
Kun la praktika lern-sekreto —
Sola plensenca kaj facila
„Por komencantoj romaneto!”

Leo Belmont.

PRINTEMP-VOĈOJ

En la dancsalono regas vigla moviĝo,
Strauss, la juna, ree foje ludis ĉe Spertl en la Vienna antaŭurbo Leopoldstadt kaj liaj melodioj, kiuj tiel refreŝige efikas kiel glaso da vino en ĝardeneto en Grinzing, kaj kiuj per sia gajiga afableco kuntiris ĉion, kio havis piedojn, allogis dancamajn arojn, kiuj plejparte parte venis alpilgrimantaj.

Kvankam la gastoj, kiuj plenigis la salonon, estis diferencaj, tamen ne mankis certa eleganteo, bona signo de la cetere komfortamaj filistroj. Ne mirinde! Oni ja povis legi sur la afiŝo en grandaj literoj: Livreo kaj ĉambristino, dormeĉpo kaj nebĝliĝo ne allasataj.

Paroj, dense flanko ĉe flanko, petolemaj grupoj kaj nur sporade kokete vestita sinjoreto, serĉanta solecan virinan estajon, ili ĉiuj interpretemigis en la densega aereo, en kiu apenaŭ videbla tremis la brileto de l’ kandeloj.

Subite silentiĝis. Strauss estis alirinta al la muzikpupitro, apogis la violonon kontraŭ la maldekstra kokso kaj levis alten la arĉon.

Nun perlondis rava melodio tra la ejo kaj paroj feliĉege turnis sin. Sennombraj virinokuloj senmove alrigardis la palan gracilan junan viron, kies okuloj disjetis pli da fajreroj en la ejon ol ĉiuj kandeloj. Noktnigraj estis la mal-

densaj lipharoj kaj la harbuklo, kovran-
ta la duonan fruntojn. Lia arĉo batis
terciojn kaj kvartojn pli fajre kaj pli
forte, ol se ili estus batoj por honoro
kaj patrujo.

La tonoj perdiĝis.

Babiante kun amiko, Strauss staris
proksime de la orkestro. Ofte oni inter-
rompis la konversacion. Eldonisto mon-
tris al li la presprovajojn de lia plej
nova valso; poste agento postulis sub-
skribon sur „koncert-kontrakto“; nun e-
leganta tieriĉa filistro alpremis sin al
li kaj petis, la majstro bonvolu kompo-
ni por la venonta amuzvespero de la
burgaj kolbasistoj konvenan valson.

Gemante Strauss fine diris: „Foje mi
volus esti homo por kelkaj horoj... ve-
turi en la Vienan Arbaron... aŭskulti tie
la dolĉajn voĉojn, kiuj ja estas nekom-
pareble pli belaj ol ĉio, kion ni, homoj,
kapablus esprimi per tonoj!”

„Kuj malgranda junfraŭlino ja povus
ankaŭ ĉeesti?” diris la amiko, premfer-
mante unu okulon.

„Ankaŭ kontraŭ tio mi ne protestas”,
rediris Strauss kaj rapidis al la pupi-
tro, ĉar la gastaro tumulte postulis ree
danci.

Kiam Strauss ekiris hejmen, estis en
tempo, pri kiu oni ne scias, ĉu oni diru
„malfrue en la nokto” aŭ „frue mate-
ne”. Balanciĝante li fajfis kanteton an-
taŭ sin. Post malmultaj horoj de mal-
kvieta dormo li ree ellitiĝis. Apud la
matenmanĝo li trovis rozkoloran letere-
ton. Li jam volis forjeti ĝin nemalfer-
mita — tiaj signoj de arda estimo estis
ja por li nenio nova; sed fine — li ne
sciis, kio premis la aroman aĵon en lian
manon, li ŝirmalfermis la leteron kaj le-
gis:

„Altsatata majstro Johano!

Hieraŭ mi aŭdis el viaj vortoj la so-
piron al unu tago en la ĉarmo de la
Viena Arbaro. Ĉi tiun semajnon estos
Sankta Vendredo, tial vi ne koncertos,
povos satsdormi kaj sabate mi atendas
vin je la naŭa ĉe la diligenco antaŭ la
doganejo de Mariahilf.

Ni veturos al Maria Brunn kaj pro-
menos tra la arbaroj al Dornbach kaj
Neuwaldegg. Poste vi certe ĝustatempe
venos al Sperl.

Ne pensu ion malbonan pri mil Mi
estas deknaujara kaj honesta knabino.

Mi volas nenion alian, ol ŝiri vin por
unu tago el via konfuzo; mi volas nur
kaŭzi, ke vi refoje povu esti homo por
kelkaj horoj.

Antaŭgojas pri la revido Helene.

Ekkonilo: Violoj ĉe la brusto.

„Majstro Johano” ridetis. Li jam ri-
detis. Li jam ricevis multajn tiajn le-
teretojn. Ĉiu skibintino celis ion alian
ol ĉi tiu. Tia afero estis nova. Li deci-
dis iri.

La Sankta Sabato venis. Strange, ke
ĝuste badaŭ lia vivo spirite preterpaŝis
cavis multajn tiajn leteretojn. Ĉiu skri-
bintino celis ion alian ol ĉi tiu. Tia a-
fero estis nova. Li decidis iri.

lin. Li vidis sin sidi antaŭ la orgeno
en la preĝejo, kie lia brava instruisto
instruis lin komponi piajn kantojn. Sed
el tio estiĝis tre monda danco, kaj eĉ
ne laŭ dulempa takto, sed en senres-
pektō valsopaŝo.

Poste la severa, ja kelkfoje vere kru-
da patro, la tirano de l' gepatra domo,
kiu ne volis ekkoni, ke la filo sekvas
lin en la majstreco. La unuaj sukcesoj,
kiuj poste ĉiam fariĝis pli entuziasmaj
— kaj tamen li neniam povis ĝui tran-
kvile la vivon. Kun abomeno li pripen-
sis, ke li verdire ĉiam kun postdrinka
kapdoloro, nedorminta, dormema, en
angulo de l' malpleniganta salono sur
menuon skizis siajn verkojn aŭ rapi-
dante de bato al bato notis ilin sur la
manumon. Tiuj senpacaj rememoroj
pliintensigis lian sopiron al la ekskur-
so en la Vienan Arbaron kun Helene,
al li ankoraŭ nekonata.

Rapide li vestis sin kaj veturis per
fiakro al la doganejo. Tie li atendigis
la veturilon kaj baldaŭ li ekvidis la kna-
binon.

Kvazaŭ porcelana pupeto ŝi tie staris
proksime de la diligenco en siaj kruc-
forme ligitaj ŝuoj kaj flordeseĝnita ve-
sto, ĉe sia brusto viol- bukedo. Sur pal-
blua rubando pendis de sur la brako la
granda paja ĉapelo. Sunplena printemp-
mateno logis en la Vienan Arbaron.
Strauss salutis, ŝi embarase ridetis. Li
kondukis ŝin al la fiakro kaj baldaŭ
rapidis la veturileto al la Vienan Arba-
ro, kiu paradis en la unua verdaĵo.

En Maria Brunn Strauss pagis la fiak-
riston kaj baldaŭ la varmeta arbaro ĉir-
kaŭis ambaŭ gajajn homojn.

Majstro Johano estis tute ne re-ek-konebla, tiom kontentege li babilis kun la bela knabino ĉe sia flanko. Kiel fianĉina kiso la vento blovetis trans la elendiĝantaj suproj, sed ekstere sur la kampoj ĉe la arbarrando ĝi senbride petolis.

Nun la vojo tien kondukis kaj Helene subite vokis:

„Majstro Johano! Ĉu vi vidas la alaŭdon levigi en la eteron? Ĉu vi aŭdas ĝian kanton, kiun ĝi, balanciĝante en la sunbrilo, kantas por la gloro al Dio?... Nun ni scias: La printempo venis... Mizeroj kaj turmento finiĝas... doloroj ĉesas, gajaj bildoj aperas, la kredo al amo kaj feliĉo vekigi!”

La vojo rekondukis en la arbaron.

„Majstro Johano”, Helene denove vokis. „aŭdu dol Ankaŭ ĉi tie la arifonto, tiom longe ne fluante, ree fluegas! Kiel ĝojkrias el la branĉoj!”

Ĉiam aliaj printemp-heroldoj salutis kun ĝojkrio kaj triumfo de sur ĉiuj arboj kaj el ĉiuj arbustoj, el de la valo supren, el de la deklivoj malsupren.

La horoj pasis al ambaŭ printempmigrantoj kiel minutoj. La suno jam estis subironta, jen nova bronza tono miksis sin en la simfonion de la naturo — la sonoriloj de rezurekcio...

Krepuskiĝis. La kantado de l' birdetoj iom post iom mutiĝis, sed alia dolĉa, milda ario nun aŭdiĝis, pli delikata kaj pli kora ol ĉiuj ĝisnunaj voĉoj: la ario de l' najtingalo.

Ĝia melodio estis plena de arda amo, sed ankaŭ malforta antaŭseno de timo kaj ĉagreno kuntremis kaj Strauss kaj Helene silente aŭskultis la sonojn, kiuj ilin ĉirkaŭprenis kiel melankolia sono.

Ili nun venis al Neuwaldegg; baldaŭ ili sidis en fiakro kaj veturis al la urbo. Strauss elpoŝigis paperfolion, sur kiun li survoje iam kaj iam skizis kelkajn notojn.

„Tio fariĝos bela vals!” li mallaŭte diris. „Kiel ĝi nomiĝu?”

Ambaŭ silentis. Estis kvazaŭ nomo devus naskiĝi, kiu povus daŭri eterne. Helene volis unue ekparoli, sed restis silenta.

„Nun?” Strauss ridetante demandis. Ŝi nun tute mallaŭte diris: „Printempvoĉoj.”

Strauss rigardis profunden en ŝiaj okulojn, nun legitajn de malseketa brilo, poste li kisis ŝin sur ŝian infanecan frunton kaj ree ambaŭ longtempe silentis... ĝis majstro Johano diris: „Kiam ni denove kunvenos, mi finkomponos la valson”.

„Majstro”, diris Helene, „mi vokos vin. Sed tiam vi devos tuj veni, kie ajn vi estos, kaj devos alporti vian violonon. Ĉu vi volas tion promesi al mi?”

„Jes!” Strauss diris simple, sed decide.

„Manskuon!” ŝi petis.

„Manskuon!” diris li kaj kisis ŝian blankan molan maneton.

Dume oni atingis la urbon. Helene petis nun pri permeso elveturiliĝi. La fiakro haltis. Kiam la ĉevaloj ree ektiris, majstro Johano mansignis al la ĉarma blondulino, kiu rapide ĉirkaŭiris stratangulon...

* * *

Jaroj pasis. Helene ne plu estis vidinta la majstron. En la nervkonsumanta kurado, pelanta la valsregiono de unu dancejo al alia, sed ankaŭ de unu lando al alia, ja eĉ trans la oceanon, nur malofte restis al li momento, rememori tiun printemp-tagon en la Viena Arbaro.

La paperfolio kun la du, tri tiam skizitaj valsmotivoj ankoraŭ ĉiam kuŝis en lia skribtablo. Ofte li estus bezoninta unu el ili, sed li neniam uzis ilin. Kiom ofte li prenis ilin en la manon, ilia rava vogleco sekrete ĝojigis lin.

Refoje printempigiĝis en la Viena Arbaro.

Strauss ĵus direktis koncerton, kiam oni transdonis al li urĝan leteron. Li ŝirfermis ĝin kaj legis:

„Majstro Johano, venu kun via violono! Helene.”

Unu momenton Strauss fiksrigardis antaŭ sin, poste li transdonis la direktadon al la unua primviolonisto kaj post unu minuto jam li sidis kun sia violono en fiakro. Veninte al sia celo, li rapidis du ŝtuparojn de malnova antaŭurba domo supren kaj eniris antaŭĉambbron, en kiu kelkaj plorantaj personoj staris. Juna homo, preskaŭ ankoraŭ infano, petis plorgemante pardonon: lia mortonta patrino esprimis kiel lastan deziron, voki la majstron al ŝia lito, nun oni al li sendis la papereton kun la vortoj laŭ ŝia diktado.

Strauss emociite eniris la mortĉambron. Mallaŭte li fermis la pordon. Li volis esti sola kun Helene. Pala ŝi kuŝis tie, direktante al li la flagrantajn okulojn, plenajn de feliĉego. Vazo kun multaj violoj staris sur la litotableto.

„Majstro... Johano”, ŝi diris kun rompiganta voĉo. „Vi... ankoraŭ ne komponis... la valson... Printemp-voĉoj.”

Jen Strauss ekkaptis sian violonon kaj ludis mallaŭte, dum Viena animeto flugis ĉielen...

Postan tagon la „Printemp-voĉoj” la unuan fojon sonis tra la koncertsalono. Kiam la majstro estis devigata, ne nombreble ofte klini sin pro danko, argentehela larmo ruliĝis sur lia pala vaugo.

Trad.: Karl Pokorny.



*Libramanto,
ĉu monkranto,
ĉu nur groŝoj
En la poŝoj,
legi ĉiu povas,
libron, ĉe ni trovas.*

Katalogon petu de la
admin. de „Pola Esp.”

BIBLIOGRAFIO

Aperis nun en Budapeŝto libro de la alt-talenta poeto Julio Baghy s. t. „La Verda Karo”. Facila romaneto el la vivo de esperantistoj en Siberio por komencantoj, por datrilaj kursoj. Eldonis ĝin la nederlandaj geamikoj de la aŭtoro, ornamis per belaj ilustraĵoj S. Berggren kaj P. & M. Ehrlich

Mi intencis skribi pri tiu ĉi „unikajo”, ĉar en neniu lingvo ekzistas simila libro por komencantoj; la ordinaraj frazoj, kiujn oni kutime renkontas en lernolibroj, estas anstataŭigitaj per plensenca, tre facila kaj interesa rakonto en formo de romaneto. Mi volis skribi detale pri la enhavo de ĉi libro por montri, ke la aŭtoro-poeto, estante militkaptito ie en angulo de Siberio, faris verajn mirindaĵojn dank’ al Esperanto, kiel instruisto de homoj el diversaj nacioj (rusoj, latvoj, rumanoj, ĉeĥoj, slovakoj kpt.). Li ne nur instruis ilin legi, skribi kaj kompreni Esperante, sed ankaŭ senti la internan ideon de Esperanto laŭ testamento de la Majstro. Li estis vere tie en tempo de la kruela mondmilito, mem katenita — granda apostolo de paco kaj amo.

Sajnas al mi, ke mia versaĵo al Julio Baghy, skribita el subita bezono de l’ koro, sufiĉas kiel recenzo pri tiu ĉi tre utila kaj leginda libreto por komencantoj.

Mi volas nur aldoni, ke pri tiu ĉi libro iu, havanta pli da tempo ol mi, devus skribi ankaŭ en pola lingvo, ankoraŭ plu devus traduki ĝin en polan lingvon, ne nur pro tio, ke tiu ĉi libro rakontas pri mirindaĵoj, faritaj de hungaro-militkaptito en la malproksima Siberio dank’ al Esperanto, sed ankaŭ pro tio, ke en tiu ĉi libro oni povas legi pri ĉarma Polino, Maria Bulska, kun kiu kunligis la aŭtoron la ora fadeno de l’ amo, rompita per necesa kaj kruela sorto, kiam la du geamantojn dividis la maro...

Leo Belmont.

Mi tralegis la libron de s-ano J. Baghy kaj tute konsentas kun Leo Belmont, ke tiu ĉi libro estas vera unikajo kiel lerno- kaj legolibro por komencantoj.

Prof. Dro Odo Bujwid.

P. S. F-ino Halina Weinstein, kiu ricevis de s-ro Julio Baghy la tradukpermeson, komencis jam traduki tiun ĉi libron kaj zorgos aperigi ĝin en la pola lingvo.

Oni sciigas nin, ke antaŭ la Jubilea Kongreso estos eldonita en esperanta traduko de IPE kun antaŭparolo de Jan Zawada konata pacifista broŝuro de Edward Ozimek „Ni volas pacon”. La libreto

enhavas pensojn kaj dezirojn de „simpla” homo rilate al organizado kaj agado de Ligo de Nacioj. Alia grava traiduko el pola lingvo, jam preparita por eldono, nome de verko de Dr. Med. Włodzimierz Budmajeff „Sur la vojoj de homa vivo kaj sano” (ĝeneralajoj kaj

moraleca flanko de la medicino tibeta) ne aperis antaŭ la kongreso, ĉar mankas necesa kapitalo. Jam aperis granda 8-paĝa prospekto de tiu verko, laŭ kiu oni povas antaŭpagi libron. Se dum la kongreso kolektiĝos sufiĉa nombro da antaŭpagintoj, verko aperos post kongreso.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

NOVA SUKCESO!

Brazila Ministerio de Komunikado en Rio de Janeiro rajtigis departementon de poŝtoj kaj telegrafoj eldoni poŝtmarkon memorigantan la Jubilean Kongreson de Esperanto en Warszawa. Tiamaniere la brazilaj Esp-istoj honorigas la patrujojn de Zamenhof okaze de la ora jubileo de la lingvo. El tio ni vidas, ke Esp. en Brazilo estas sufiĉe disvastigita. 41 landoj postulis alsendon de la poŝtmarko aperigita pasintjare pro la kongreso en Brazilo. Venis 3800 postuloj, inter ili el Polando 304, Usono 218, Holando 344, Britujo 120, Svedujo 200, Ĉeĥoslovakujo 138, Germanujo 187, Francujo 171 ktp.

P. S. La supre menciitan poŝtmarkon, neŝtampitan oni povas ricevi ĉe admin. de „Pola Esp.” sendante 40 gr. (en poŝtmarkoj) por Polujo aŭ 1 respond-kupon por eksterlando.

UWAGA! WAŻNE!

Polscy esperantysty opłacają za udział w Kongresie zł. 25.—. Młodzież szkolna zł. 14.50. Dalsze zniżki nie są przewidziane! Komitet Organizacyjny Kongresu (Al. Jerozolimskie 39/11) wzywa polskich esperantystów do wzięcia masowego udziału w Jubileuszowym Kongresie.

„Nia Gazeto” en la 6-a numero pri-skribas detale la Internacian Konferencion en Parizo s. t. „Esperanto en la Moderna Vivo” okazintan la 24—27 de majo kj. Interalie ni legas en la artikolo:

S-ro Waringhien majstre gvidis la tutan diskutadon. Holanda kaj Pola instruistoj, Angla ĥinspektoro de lernejoj, multaj aliaj kompetentuloj siavice alportis detalajn informojn, konstatojn, proponojn; la demandon ĉiuj zorge pristudis kaj traesploris; ĉu la metodo Ĉeĥ taŭgas por infanoj? kiu estas la plej taŭga horo por la kursoj? ĉu ekzistas bona materialo de legado por infanoj? ĉu ekzistas sufiĉe da kleraj profesoroj? Pola instruisto (Prof. Mieczysław Sygnarski el Bydgoszcz) diris, ke estas neeble efike propagandi se oni ne havas apogon de eminentaj personoj fame konataj de la registaro.

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” uskutecznić można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 20, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anoncento de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

20. — KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDARCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.